# La Letero

Espéranto Angers


2019 - 02

# Ĝenerala kunveno

La Membra Kunveno de Esperanto-Angers okazos

**SABATON LA 2-AN DE MARTO 2019 - 14h**

en "Centre Jean Vilar" (ĉe strato Henri Bergson, en kvartalo "La Roseraie"), en salono "Mot à Mot".
La membroj, iliaj familioj kaj iliaj amikoj estas invitataj al tiu simpatia jara kunveno kun reĝkuko, amikuma kuntrinkado, libroservo.
Estas bonetosa nemaltrafinda momento !



# Nova esperantista asocio

Nova asocio estis fondita en la nanta regiono : CELI (Couëron Espéranto Langue Internationale). Ĝia sidejo troviĝas ĉe Christiane Lamy kaj Maurice Foucher, 36 rue Jean Bart, 44220 Couëron. Ĝia prezidanto estas Luc Gouverneur, la kasistino Christiane Lamy.


Retadreso : coueron-esperanto@orange.fr.

Blogo : www.coueronesperanto.blogspot.com

Facebook : http://www.facebook.com/CoueronEsperanto

Telefono : 06 300 300 98

# Legindaj libroj




## OKULOJ

Marjorie Boulton
(1924 - 2017)
*Brita verkistino kaj poetino*

13 tekstoj kiuj pripensigas nin pri psikologio virina. Tiu fama esperantista aŭtorino ĝuigas la leganton per sia karakteriza stilo..

*(Laŭ recenza parto de J. Devis – Boletin n-ro 30/1968)*




## LASU MIN PAROLI PLU !

Claude Piron
(1931 - 2008)
*Svisa tradukisto kaj psikologo*

Temas pri sentoplena novelaro por maturaj lernantoj.
La 25 noveloj estas en ordinara vivoplena stilo. Ili povas esti paralelaj al la lingvo-instrua romano «Gerda malaperis».

*(Laŭ recenza parto de R. Lloancy - Revuo Esperanto n° 961)*

***Eblas prunti tiujn librojn, kaj multajn aliajn, el nia biblioteko.***

# Vizito de la Kroato Alan Kovacic

De la 30-a de januaro ĝis la 1-a de februaro, Alan Neven Kovacic, el Kroatio, haltis en Angers enkadre de preleg-turneo en Francio kaj en Belgio. Dum multaj jaroj, Alan organizis internaciajn rondvojaĝojn kaj ŝipajn krozvojaĝojn kaj ankaŭ laboris pri interpretado kaj tradukado, interalie por sindikatoj kaj internaciaj kunvenoj (lingvoj kroata, franca, angla, Esperanta, itala kaj serba).

Dank'al sia profesia vivo kaj siaj multaj vojaĝoj (en pli ol 50 landoj!), li fariĝis spertulo pri prelegoj pri multaj temoj kaj aparte pri tiuj kiuj rilatas al la eŭropa historio kaj geografio. En Angers, li interalie parolis pri la serbokroata lingvo(*) kaj ankaŭ pri la historio de Kroatio kiu komenciĝis per la mezepoka kroata ŝtato en la 10-a jarcento !

Gastigita de Esperanto-Angers, Alan profitis sian ĉeeston por malkovri la urbon, la kastelon, la urbocentron, ktp. Ĉiuj, li mem kaj la Esperanto-parolantoj de Angers, longe interparolis pri ambaŭ landoj, Kroatio kaj Francio, pri socio, pri politiko....

(*) Lingvo serbokroata, aŭ kroatoserba, aŭ kroata, aŭ serba, aŭ... ĉirkaŭ 10 malsamaj nomoj por kvazaŭ-sama lingvo, klarigis Alan.



### Logiko de 4-jara infano :


Anekdote, Alan rakontis ke, kiam li estis 4-jara, lia familio akceptis Germanon, kiu tiam vojaĝis en Kroatio. Pri komunikado zorgis lia onklo, kiu scipovis la germanan. Post foriro de la gasto, la onklo instigis ĉiujn familianojn lerni la germanan ĉar "*tio tre utilas por komuniki*". Tiam la eta Alan demandis lin : "*Kaj la Germanoj, ĉu ili lernas la kroatan ?*". Sekve de la negativa respondo de la onklo, Alan pludemandis, tre logike : "*Kial ni, ni devas lerni ilian lingvon dum ili ne devas lerni nian lingvon ?*" ! Kiel konkludas Alan mem : "4-jaraĝe mi tiam neniam estis aŭdinta pri Esperanto sed mi jam estis sentema pri lingva maljusteco en internacia komunikado" !

# Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono




De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto de 2019, Barcelono iĝos denove (simbole) la *fajra rozo.* Okazos tie la jara internacia kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, internacia laborista grupo, kies membroj havas Esperanton kiel komunikan lingvon.
La laborkunsidoj de la malsamaj frakcioj de la asocio (liberecana, komunisma, liberpensula, ekologiisma, ktp.) estas malfermitaj al ĉiuj, sed nur membroj havas voĉdonrajton. Aldone, la programo enhavas koncertojn, prelegojn, prezentojn de libroj... Estos ankaŭ kursoj de diversaj niveloj por lerni kaj praktiki la internacian lingvon, kaj aliaj aktivaĵoj kiel gvidata vizito al Can Masdeu, projekcio de la filmo Tero kaj Libero subtekstita en Esperanto, kaj debato kun la kamaradoj de Calúmnia
( http://calumnia-edicions.net/ ) pri la rolo de tiu lingvo en alternativaj eldonprojektoj.
La kongreso okazos en Martí Codolar, salesiana gastejo, kiu lokiĝas en la kvartalo Horta. Krom lokaj esperantistoj, estas nun aliĝintaj homoj de Britio, Aŭstralio, Brazilo, Kanado, Koreio, Kongolando, Kubo, Finlando, Francio, Italio, Portugalio, Serbio kaj Svislando.
Oni povas trovi pli da informoj ĉi tie :
www.satesperanto.org
Oni povas aliĝi ĉi tie : http://www.satesperanto.org/spip.ph...
Kaj oni povas kontakti nin ĉe : satbarcelono2019@gmail.com

# OSIEK-Premio por anĝevano !



OSIEK*-Premio estis aljuĝita en 2018 al nia amiko Frédéric Lauriol por la realigado de la **Esperanta Teknika Vortaro de Greziljono**. Gratulojn !

*OSIEK estas internacia societo, kiu celas la organizadon de altnivelaj,kulturaj eventoj, liberaj kaj sencenzuraj.

# Humuro

## Revenante el la lernejo

Maljunula paro festis sian sesdekan geedziĝan datrevenon. Ili interkonatiĝis en sia infanaĝo. Nun, ili man-en-mane promenadas en la ĉirkaŭaĵoj de sia junaĝo kaj denove volas vidi sian malnovan lernejon.
La krado ne estas fermita. Do ili eniras kaj trovas la malnovan skribotablon, kiun ili kunuzis kaj sur kiun Louis gravuris: "Mi amas Claire-n".
Survoje al ilia hejmo, ili trovas sakon kiu hazarde ĵus falas el kamioneto preskaŭ ĉe iliaj piedoj.
Claire prenas ĝin kaj kunportas hejmen.
Tie ŝi malfermas la sakon kaj nombras ... kvindek mil eŭrojn!
Louis tuj malaprobas: "Ni devas redoni ĝin".
Claire respondas: "Kiu trovas, tiu gardas" Ŝi remetas la monon en la sakon kaj kaŝas ĝin en la subtegmenton".
La sekvan tagon, du policanoj venas enketi en la kvartalo.
Ili frapas ĉe ilia pordo:
"Pardonu nin, ĉu vi trovis sakon hieraŭ, kiu falis el iu kamioneto ?"
Claire tuj respondas: "Ne".
Louis: "Sed ŝi mensogas! Ŝi kaŝis ĝin en la subtegmenton.
Claire: "Ne kredu lin, li estas senila".
Unu el la policistoj tamen turniĝas al Louis kaj demandas lin : "Bonvolu rakonti al ni la historion ekde la komenco."
Louis: "Nu, jen... Hieraŭ, Claire kaj mi estis revenantaj el la lernejo, kaj ..."
La policisto, surprizita : "El kie vi revenis ?"
Louis: "Ni revenis el la lernejo !"
Tuj la policisto turnas sin al sia kolego: "Venu, ni foriru ...!"

**Espéranto-Angers**
3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr